



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

Semajno de Internacia Amikeco

S I A 1977

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel
Postfach 2113 1
D-85 Nürnberg
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

Vidu la speci-
alan eldonon
de PP

N-ro 7/77 - 16 feb 1977

Aperas ĉiusemajne

Akcepto de la Eŭropa Komisiono

Bruselo (pp) - D-ro P. Denoel, la prezidanto de la Eŭropa Esperanto-Centro, estis akceptita de s-ro Sidet, fakestro pri Informado en la Eŭropa Komisiono (Palais Berlaymont, Bruselo,). La akcepto estis tre afabla.

Pri tiu akcepto d-ro Denoel raportas:

"Mi unue precizigis la ambicion de Esperanto kiel eblan alternativan solvon por la lingvaj problemoj de la eŭropaj instancoj: 1. ebleco de rekta kontakto inter funkciuloj; 2. gajno de tempo kaj mono; 3. evito de lingva diskriminacio.

Mi substrekis ke jam nun ni (t.e. la esperantistoj) tre utile kontribuas al eŭropa integriĝo: 1. kunlaboro kun asocioj por Eŭropo, eldono de "Eŭropa Dokumentaro"; 2. disponigo de taŭga komuna lingvo al eŭropanoj, kiuj scipovas neniun alian lingvon krom la nacia; 3. nia gazetaro regule informas pri Eŭropo.

Mi ĉefe reĝustigis la misinterpreton de la rezolucio de Eindhoven en la respondo de la Komisiono al s-ro Laban. Mi insistis pri la pedagogia valoro de Esperanto por lernado de naciaj lingvoj kaj pri nia ĝenerala pozicio rilate al la multlingvismo.

Klarigante la funkciadon de la Eŭropa Komisiono kaj ĝian povon, s-ro Sidet substrekis ke nia letero al la nova ĝenerala prezidanto estis la ĝusta proceduro, kaj respondo alvenos. Rilate la alprenon de nova lingvo, Esperanto, en E.K., ne la Komisiono povas decidi sed la ŝtato-membroj.

La nova eŭropa Parlamento de 1978 estos multe pli dediĉova. Por proponi Esperanton, la sola proceduro estos la parlamenta vojo. La centra argumento devus esti la giganta pezo de la elspezoj por tradukado kaj interpretado en la eŭropaj instancoj.

Pri la principo de reciproka informado, EEC devas daŭrigi sian informadon (utilaj adresoj estis transdonitaj al mi) kaj de nun EEC ricevos la ĉiusemajnan informbultenon de EK kaj aliajn gravajn informojn. En unu el la januaraĵoj bultenoj estas artikolo tre edifa: "Babelo, ĉefurbo de Eŭropo". Ekzistas en E.K. nek oficialaj "konsultaj rilatoj", nek aliĝebleco de "neregistaraĵoj".

Unua kontakto, sed fruktodona! "

Anonceto

Kiu helpas? Urĝe estas serĉata la romano de Jánoš Kodolányi "Und er führte sie aus Ägypten", ein Moses-Roman, Stuttgart 1965, Steingrüben. La libro estas traduko el la hungara originalo "Egő csikkebokor"

Proponojn sendu al: Dr. J. Kondor, Alte Schloßstr. 25

D-5450 Neuwied 21

50-a Kongreso de S.A.T. en Augsburg

Parizo (pp) - La SAT-gazetarservo informas: "Por la dua fojo en la vivo de Sennacieca Asocio Tutmonda la Aŭgsburga SAT-Rondo invitas la jaran kongreson de la Asocio al sia urbo. La Kongreso okazos de la 30-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 1977 en Kolping-Domo, kiu troviĝas en la centro de la urbo kaj estas facile atingebla de ĉiuj kongresanoj, kiuj loĝas en hoteloj. Sed troviĝas ankaŭ ĉambroj kun 6 - 8 litoj ĉe la Kongresejo mem.

En la semajno sekvanta ripozemuloj trovos ĉambron en Naturamika Domo en Bodman, apuda la Bodenlago (Konstanca Lago). Ĝi troviĝas apud la svisa landlimo. La 32 ĉambroj kun po du litoj estas jam menditaj, do ne plu eblas aliĝi.

Koncerne la kongresan semajnon la Aliĝilo kun detalaj informoj pri la kostoj de aliĝo, loĝado, manĝoj, ekskursoj ktp. estas akirebla ĉe la sekretaria adreso: Hermann Schmid, Alte Reichsstr. 31 f, D-8901 Steppach. Kasisto estas Gerhard Kunze (Panoramastr. 25, D-7290 Freudenstadt 1, poŝtĉekkonto Stuttgart 465 64-705), al kiu oni sendu la aliĝilon kun la mono (antaŭpagoj).

La Esperanta Teatro Pariza T.E.S.P.A prezentos teatraĵon de A. Camus "La Justuloj".

Duontaga ekskurso en la aŭgsburga ĉirkaŭaĵo estos ligata kun vizito al bierfarejo aŭ alia industria entrepreno. La tuttaga ekskurso kondukos en la Bavaraĵn alpojn kaj oni vizitos plej famajn tieajn vidindaĵojn.

Ĉiunonate aperos komunikilo pri la organizado de la Kongreso en "Sennaciulo", la oficiala organo de S.A.T. Por aliĝi al S.A.T. (pli favora aliĝprezo al la Kongreso) kun samtempa abono al "Sennaciulo" vi skribu aŭ al la SAT-Centro (67 av. Gambetta, F-75020 Paris) aŭ al unu el la landaj perantoj (listo de perantoj en januara numero de Sennaciulo).

Reggio Calabria kaj Esperanto

Reggio Calabria (pp) - Estis veraj Esperanto-tagoj en tiu belega suda urbo Itala, en Reggio Calabria, de la 8-a ĝis la 10-a de januaro 1977. La 8-an okazis ekzamenoj por la partoprenantoj de la Esperanto-kurso, la 9-an renkontiĝis la Estraro de Itala Fervoĵista Esperanto-Asocio (I.F.E.A.) kaj la 10-an okazis konferencoj en la lernejo "P. Galluppi".

Por tiuj kiuj ne konas sufiĉe la Italan geografion, mi sciigu, ke Reggio Calabria estas ĉe la pinto de la Itala "boto" ĝuste kie la "boto" mem pli proksimiĝas al la insulo Sicilio.

La Esperanto-medio tie estas fervoja.

La sepan de januaro mi veturis al Reggio Calabria por ekzameni en nia lingvo 15 gekursanojn, fervoĵistojn aŭ gefamilianojn, kiuj preskaŭ aŭtodidakte lernis Esperanton. Mi vere ĝuis ĉar la kandidatoj estis bone preparitaj kaj ĉiuj bone sukcesis.

La fervoĵista grupo, kiu estis antaŭ 4 jaroj, ne nur interesiĝis pri la ekzamenoj, sed organizis du konferencojn kaj debatojn ĉe la elementa lernejo "Galluppi" en la ĉeesto de 300 gelernantoj, akompanataj de la direktoro, de la vic-direktoro kaj de la geinstruistoj. La preĝejo de d-ro Menabene estis longe aplaudata kaj la viglaj debatoj ĝojigis la esperantojn, la geinfanoj montris intereson.

"Tele-Reggio" sendis teknikiston kaj, la saman vesperon, per la urba

televido, la loĝantaro eksciis kio estas Esperanto kaj konis la tradukojn de simplaj frazoj. Tio certe estas bonega propagando por nia lingvo.

Pri la urbo

Nun iom pri la urbo Reggio Calabria, kiun eble granda parto de eksterlandanoj, kaj eĉ italoj, ne konas.

La urbo, kuŝanta inter la plej bela kaj pura maro de Italio kaj la montaro Aspromonte (fama pro la batalo inter Garibaldi kaj la soldatoj de Vittorio Emanuele la dua), estas unu el la plej belaj kaj histori-riĉaj urboj de Suda Italio; certe unu el la antikvaj.

La fruktodona tero, kiu ĝin ĉirkaŭas, estas parfumita per jasmenoj kaj oranĝfloroj; la ĝardenoj oras pro la multnombraj madarinoj, oranĝoj kaj bergamotoj. Ĉi tiuj lastaj estas troveblaj nur en tiu ĉi regiono.

Sinsekvo da oliv- kaj figarboj, agavoj kaj bananoj alternas kun migdaloj jam florantaj; dum en la nordo de la lando abundas neĝo, pluvo kaj nebulo.

La markolo, kiu dividas Reggio Calabria de Sicilio, nokte, reflektas la lumojn, kiuĵ, kiel perloj, brilas laŭlonge de la du marpromenadoj: La Calabria kaj la Scilia; dume la ŝiplampetoj atestas la laboremon de la multaj fiŝkaptistoj.

Mi skribis ke Reggio Calabria estas antikva urbo; fakte ĝia origino perdiĝas en la pratempoj. Legendo rakontas pri mita fondinto: t.e. nepo de Noa je kies nomo estas titolita urba strato. Post la ekstermiga tertremo de la jaro 1908, ĝi renoviĝis kaj nun estas moderna kaj progresema urbo.

Mi vizitis ĝian Nacian Muzeon kaj povas certigi ke ĝi estas tre interesa, certe la plej riĉa en la mondo pro sia kolekto da "pinakes" (malgrandaj, argilaj, skulptitaj kaheloj) elfositaj en Locri, ĉefurbo de la iama Magna Grecia". Tre interesa la katedralo, kiu konservas parton de la kolono, nomata: de Sankta Paŭlo. Ĝi bruliĝis, kvankam marmora, kiam la Sanktulo haltis en Reggio Calabria dum sia vojaĝo al Romo (jaro 61-a p.K.)

La impona restaĵo de la Aragona kastelo gardas la urbon, sed mi ekkris pro miro, ĉe la vido de la belega marpromenado, riĉa je tropikaj centjaraj plantoj, monumentoj al plej elstaraj urbanoj kaj al la famaj italaj poetoj Pascoli kaj D'Annunzio kiu nomis ĝin: "la plej bela kilometro de Italio". Interkrampe: En la pratempoj nur ĉi tiu eta teritorio estis indikita kiel Italio, nomo nun etendita ĝis la Alpoj.

Esperantistoj: Do venu multnombre al Reggio Calabria, somere kaj vintrere! Vi ĝuos mildan klimaton kaj belegajn strandetojn! La enloĝantoj, tre ĝentilaj kaj helpemaj, atendas vin! Faru kiel mi: mi venis, vidis, admiris kaj.....revenos!

Delvina Gimelli

Libropropono de la semajno

Internacia komerca-ekonomika vortaro en 9 lingvoj

(Esperanto, Angla, Germana, Hispana, Franca, Itala, Nederlanda, Portugala, Sveda)

15,5 x 22 cm, bind., 535 p.,

Prezo 65.-- GM

Mendu ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113
D-8500 Nürnberg 1, Poŝtĉekkonto Nürnberg 819 56-851

Esperanto en Radio

Atentigo de Radio Vieno

"Ni urĝe atentigas, ke la rubriko 'Esperanto en Radio' de la februara numero de 'esperanto' (eldonata de la Universala Esperanto-Asocio) entenas eraran indikon pri niaj elsendoj sur meza ondlongo 203,4 metroj. Ili okazas ne plu ĉiun kvaran mardon, sed ĉiun ĵaŭdon je la 18,50 horo kaj estas tre bone aŭdeblaj ankaŭ en eksterlando, ekzemple en Ĉeĥoslovakio kaj la Germana Demokratia Respubliko. La unuaj du minutoj de ĉiu ĵaŭda elsendo estas en germana lingvo, la restaj tri minutoj en Esperanto."

Dr. J. Kondor, Neuwied skribas: IBRA-radion mi povis bonege kapti kaj surbendigi lastan mardon! La unuan fojon mi sukcesis kapti ĝin! IBRA estas bonega konkurencio por Radio Vatikana!! Pekinon mi ankaŭ sukcesis kapti....!

Zagrebo. Por tiu kiu restas maldormanta ĝis noktomezo la vendredaj elsendoj de Radio Zagrebo ĉiam estas senĝena ĉuo. Post la kutimaj "Novaĵoj el Jugoslavio" oni ĉi-foje povis aŭdi sonraportojn pri la Esperanto-vivo en la kroata urbo Osijek.

Varsovio. Ĉi-foje ni volas speciale atentigi pri la Esperanto-anguleto kadre de la germanlingva programo, kiu estas disaŭdigata trifoje ĉiudimande, je la 6,30, 17,30 kaj 22,00 horoj. En la pasinta anguleto Jerzy Grum raportis pri la preparoj de la Eŭropa Esperanto-Kongreso en Paderborn.

ORF, Wien. Ni prezentas ĉi-foje la tekston de la lastsemajna komentario de d-ro Alfred Macher:

"Kaj la ĝenerala sekretario de UNO, Kurt Waldheim, vizitanta ĝuste nun la ĉefurbojn de la Proksima Oriento, kaj liaj personaj sekretarioj estas aŭstroj. Ekzistas inter Vieno kaj ili iuj kontaktoj, kiuj havigas al ni informojn sufiĉe fidindajn por prognozo de paco en la Proksima Oriento.

Certe Kurt Waldheim, same kiel kanceliero Bruno Kreisky, kiu siavice penadas pri la paco, ne sukcesis gajni la simpatian de la izraelianoj, ĉar ambaŭ diris, ke apenaŭ eblos solvo de la konflikto, se oni ne respektos la rajtojn ankaŭ de la palestinanoj.

Tamen ankaŭ en Izraelio, kvankam iom malpli ol ĉe la araboj montriĝas preteco al kompromiso. Konsciiginte, post grava malvenko en Lebanono, pri sia malforto kaj pri la dubindeco de helpe flanke de siaj arabaj fratoj., la palestinanoj nun cedemas kaj volus esti kontentaj kun malgranda palestina ŝtato ekster la teritorio de Izraelio. Kvankam la izraelianoj prave ne tro fidas la palestinanojn pro ties konata ŝanceliĝemo, ili devus atenti la ŝancojn de la nuna situacio kaj akcepti la proponojn de la aŭstro Waldheim pri re-dadriĝo de la ĝenevaj pac-intertraktoj.

Ankaŭ Usono, kiu deziras baldaŭan malstreĉiĝon en la Proksima Oriento, kaj promesis, sub sia nova administracio konsiderindan ekonomian helpon al Egiptio, sendube urĝos, ke cedu ankaŭ Izraelio.

Do la esperoj pri paca solvo trovos eble konfirmon."

Pilo-Press, ĉiusemajna internacia informservo, jara abonprezo 30,-GM, Redaktoro Ludwig Pickel, Nürnberg. Bonvolu pagi la abonkotizon al Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1, Poŝtĉekkonto Nürnberg 819 56-851.

Germana Eldono "Esperanto-Nachrichten-Dienst" aperas dufoje monate kaj kostas jare 15,- GM.